

KRONIKA / CHRONICLE

28. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V. Berlin, 24.-25.11.2018

Am Wochenende des 24. und 25. Novembers 2018 fand in Berlin-Lichtenberg die 28. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V. (GIL) statt. Mit rund 45 Teilnehmern war diese Tagung ausgebucht, was zum einen der verkehrsgünstigen Lage der neuen Tagungsstätte am Ostkreuz, zum anderem dem Schwerpunktthema „*Sprache und Globalisierung*“ zu verdanken war.

Wie üblich wurden aber auch eine Reihe von Beiträgen gehalten, die andere Themen der Interlinguistik im weitesten Sinne bedienten. Sprache aller vierzehn Vorträge war Deutsch, wobei sechs der Referenten eine andere Zweitsprachler waren, was den internationalen Charakter der GIL und auch die noch nicht verloschene Kraft des Deutschen als Wissenschaftssprache unterstreicht.

- Genau letzteres Thema, die Stellung des Deutschen in der Welt, wurde im Eröffnungsvortrag des renommierten Germanisten Ulrich Ammon (Duisburg) „*Die heutige globale Sprachenkonstellation: sprachpolitische Aspekte mit Blick vor allem auf die deutsche Sprache und auf Esperanto*“ ausführlich besprochen (nicht nur in Bezug auf die Wissenschaft), mit einigen abschließenden Bemerkungen zu Esperanto.
- Goro Christoph Kimura (Tokyo) stellte „*Interlinguale Strategien im Vergleich*“ dar. Aufbauend auf früheren Klassifikationen (u. a. vom vorgenannten Ammon) legte er eine vollständige Systematik aller denkbaren Kommunikationsformen zwischen Verschiedensprachigen vor und zeigte ihre distinktiven Merkmale auf.
- Věra Barandovská-Frank (Paderborn) sprach über die „*Globalisierung des Französischen (von der internationalen Sprache zum Franglais)*“. Nach einer Einführung über die Geschichte der französischen Sprache und besonders ihrer Normierung gab sie einen Überblick über den Einfluss des Englischen auf die moderne Umgangssprache und dessen soziolinguistische Implikationen.
- Ilona Koutny (Posen) stellte in „*Globalisierung – internationale Kultur – internationale Sprachen*“ die Unterschiede zwischen den Sprachen Englisch und Esperanto

als Mittel der internationalen Kommunikation, besonders als Träger der jeweiligen Herkunftskultur, dar.

- Svetlana Burenkova (Omsk) stellte „*Deutsche und russische Lebensnormen im Spiegel der Sprachen*“ vor und erörterte die Frage, wie sich die Globalisierung auf diese auswirkt. Ihr besonderes Augenmerk galt Antisprichwörtern, in denen sich moderne Gegentendenzen zu altbekannten Normen manifestieren.
- Cornelia Mannewitz (Greifswald) ging in ihrem Vortrag „*Surżyk: ukrainisch-russische Mischsprache*“ sprachgeschichtlich und soziolinguistisch auf dieses Phänomen der Umgangssprache in der Ukraine ein und legte dar, wie es im dortigen Diskurs heute gesehen wird.
- Der Vortrag von Michał Kozicki (Posen), „*Der englische Einfluss auf Neologismen im Amharischen*“ beschäftigte sich vor allem mit der Wortbildung dieser wichtigsten Sprache in Äthiopien, mit dem Spannungsfeld von Entlehnungen, Lehnübersetzungen und eigenständigen Bildungen (bzw. Übernahmen aus dem Altäthiopischen).
- Kristin Tytgat (Brüssel) zeigte in „*Esperanto und Globalisierung*“, am Beispiel des aus dem Englischen übersetzten *UNESCO-Kuriers*, welche Strategien (z. B. Lehnübersetzungen) Esperanto-Sprecher bei der Konfrontation mit bisher unbekanntenen Konzepten anwenden.
- Cyril Robert Brosch (Berlin) gab in „*Einige Bemerkungen zur Muttersprachlichkeit in Esperanto*“ einen kurzen Forschungsbericht zu den sog. *denaskuloj*, warum sie nicht unkommentiert ‚Muttersprachler‘ genannt werden sollten, sowie zwei ausführliche Fallbeispiele für den Spracherwerb des Esperanto als L1.
- Bernd Krause (Forchheim) zeigte in seinem Vortrag „*Esperanto und Olympia*“, wie besonders zwischen 1910 und 1970 versucht wurde, die Olympischen Spiele und andere Sport-Großveranstaltungen für das Werben für die Idee des Esperanto nutzbar zu machen, mit sehr bescheidenem Erfolg.
- Roland Schnell (Berlin) stellte „*Querverbindungen zwischen Esperanto und der lebensformalerischen Zeitschrift „Der Vortrupp“*“ auf, indem er zunächst einen Überblick über die Bewegungen im späteren Kaiserreich gibt und dann besonders die Überschneidungen in der Person Ernst Kliemkes (alias Heinrich Nienkamp) eingang.
- Ortwin Zeitlinger (Berlin) stellte „*Eine neue Orthographie für alle Sprachen*“ vor, in der er versucht, eine ganze Reihe v. a. in Europa gesprochener Sprachen mit einer einheitlichen und dabei weitgehend auf Sonderzeichen verzichtenden Rechtschreibung auf phonetischer Basis für alle einheitlich aussprechbar zu machen.
- Martin Haase (Bamberg) stellte „*Jenseits des Globalen – Zur Typologie des Klingonischen*“ die phonologischen, morphologischen und syntaktischen Eigenheiten dieser Science-Fiction-Sprache von Marc Okrand dar und zeigt auf, dass sich Klingonisch typologisch nicht erheblich von irdischen Sprachen unterscheidet.
- Zuletzt sprach Sabine Fiedler (Leipzig) „*Zu einigen Ergebnissen des Projektes „Mobility and Inclusion in Multilingual Europe (MIME)“*“, in dem mehrere Mitglieder der GIL in den letzten vier Jahren Grundlagenforschung zu Mehrsprachigkeit geforscht und konkrete Handlungsempfehlungen für Entscheidungsträger entwickelt haben.

Die schriftliche Veröffentlichung der Beiträge ist im Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik (JGI 2019) geplant, dessen Ausgabe 2018 genau zur Tagung als Buch sowie auf <http://www.interlinguistik-gil.de> erschienen ist. Außerhalb des Programms konnte Bernhard Pabst (Berlin) auch sein gerade erschienenenes, mit Gonçalo Neves erarbeitetes *Historia Vortaro de Esperanto* (Belegstellenwörterbuch für die frühesten Lexeme) vorstellen.

Neben dem wissenschaftlichen Programm fanden vereinsrechtliche Veranstaltungen statt, am Samstagabend die Jahreshauptversammlung der GIL mit der Bestätigung des bisherigen Vorstands in seinen Ämtern, sowie am Sonntag eine Abschlussdiskussion, in der Zufriedenheit mit der neuen Tagungsstätte, der nunmehr dritten in drei Jahren, geäußert wurde und Themenvorschläge für die vom 22. bis 24. November 2019 an gleicher Stelle stattfindende 29. GIL-Jahrestagung gemacht wurden.

Cyril Robert Brosch (Berlin)

RESUMOJ EN ESPERANTO

INTERLINGVISTIKO

Věra BARANDOVSKÁ-FRANK: **Konceptoj de interlingvistiko**

Interlingvistiko ekestis kiel scienco stariganta normojn por helplingvoj, sed tra sia centjara historio ĝi estas komprenata pli kaj pli vaste, ĝenerale kiel interdisciplina sciencobranĉo inkludanta diversajn aspektojn de komunikado, lingvoplanado kaj lingvonormigon, multingvecon, lingvopolitikon, tradukadon, sociolingvistikon, historion kaj literaturon de planlingvoj ktp. Tiu ĉi etendita koncepto ebligas al diversaj sciencistoj, esploristoj, societoj kaj organizaĵoj trakti interlingvistikon el la plej diversaj vidpunktoj kaj kunlaborigi specialistojn pri multaj koncernaj kampoj. Unuflanke montriĝas neekzisto de unueca enhavkompreno, kiun oni povas sperti ekzemple en vikipedioj. Aliflanke, la larĝe difinata kompreno kaj malfermas al interlingvistiko novajn horizontojn, kaj ebligas pli profundan specialiĝon en unuopaj aspektoj. Tial la estonteco de interlingvistiko povas esti vidata pozitive: ekzistas ankoraŭ multaj interesaj kampoj por malkovri – ĉu reanalizante historiajn dokumentojn, ĉu sekvante la plej novan ondon de interret-apogata lingvokonstruado kaj aktivecon de poliglotoj, ĉu observante la naskiĝon de novaj sciencaj specialiĝoj kaj subbranĉoj kiel slava interlingvistiko.

Irmina KOTLARSKA: **Volapuko kiel sukcesa lingvo en la lumo de elektitaj polaj lernolibroj el la 80-aj jaroj de la XIX-a jarcento**

En la interescentro de la artikolo troviĝas polaj lernolibroj de la lingvo volapuko eldonitaj en la 80-aj jaroj de la XIX-a jarcento. La analizataj tekstoj ilustras la t.n. lingvan konduton en edukaj societaj situacioj (eduka diskurso) en la pasinteco. Speciala celo de la analizoj estas montri la lingvajn operaciojn uzatajn far la aŭtoroj de tiuj ĉi lernolibroj por altiri aliajn al la lernado kaj uzado de la lingvo volapuko. Stilistika-pragmatika aliro estis aplikata al la emociaj kaj raciaj argumentataj ekzemploj, al la sistemaj kaj retorikaj iloj de konvinkado. La analizado ebligas konstati ke en la lern-materialoj, krom la transigo de scio, okazas kreado de pozitiva bazo por la ideo uzi la internacian lingvon.

Jan van STEENBERGEN: **Interslava lingvo kiel lingvafrankao por Centra-Eŭropo**

Interslava lingvo estas zona konstruita lingvo, bazita sur komunaj elementoj de slavaj lingvoj. Ĝi unuavice celas esti maksimume komprenebla por slavo sen antaŭa

studado. En la epoko de tutteriĝo kaj amasturismo, ĝi malfermas novajn perspektivojn por transnacia komunikado en Centra kaj Orienta Eŭropo. La regiono konsistas el pluraj unuavice malgrandaj ŝtatoj, el kiuj preskaŭ ĉiuj havas malsamajn lingvojn kiuj apenaŭ estas konataj ekster iliaj teritorioj. La kono de la angla kaj aliaj fremdaj lingvoj estas daŭre en malalta nivelo, kaj la eblecoj de akcepta multlingvismo estas limigita. Ĉar ĝi estas altgrade komprenebla inter slavoj, la *interslava lingvo* provizas elstaran alternativon por unuflanka komunikado, ekz. en gvidlibroj, broŝuroj, flugfolioj kaj retejoj.

ESPERANTOLOGIO

Nicolau DOLS SALAS: **Fonologio de Zamenhof**

La elirpunkto de tiu ĉi artikolo estas la supozo ke esperanto estas vivanta lingvo, kvankam origine konstruita. La fonologia teorio kiel lingvistika branĉo ne estis evoluinta en la epoko kiam L. L. Zamenhof planis esperanton. La 19-jarcenta fonologio estas analizata en la pli ĝenerala kadro de lingvistika disvolviĝo kaj komparata al la decidoj de Zamenhof en tiu ĉi tereno.

Karina GONÇALVES DE SOUZA DE OLIVEIRA: **Adapto de pruntvortoj en Esperanto**

Ĉi tiu esploro analizis per kiuj fonologiaj vojoj novaj radikoj eniras en esperanton. La vortoj estis selektitaj el la revuoj *Kontakto*, oficiala revuo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo* (TEJO), eldonita ekde 1963, sendita al abonantoj en pli ol 90 landoj, kaj *Esperanto*, oficiala revuo de *Universala Esperanto-Asocio* (UEA), kiu estas publikigita ekde 1905 kaj sendata al legantoj en pli ol 115 landoj, krome el la terminologia listo pri teknologio (Nevelsteen 2012) kaj ankoraŭ vortoj listigitaj kiel ne vortarigitaj en la blogo <<http://vortaro-blogo.blogspot.com.br/2009/09/nepivaj-vortoj-i.html>>. Estis kolektitaj vortoj el 13 lingvoj: araba, ĉina, korea, hispana, franca, angla, japana, komia, portugala, rusa, turka, sanskrita kaj svahila.

La teoria bazo, kiu gvidis la analizon, estis la *Pruntvorta Fonologio (Loanword Phonology)*, precipe la verkoj de Calabrese & Wetzels (2009), Vendelin & Peperkamp (2006), Paradis (1988), Kang (2011), Friesner (2009), Menezes (2013), Chang (2008) kaj Kenstowicz & Suchato (2006), Roth (1980). La analizo de la korpuso montris, ke la vortoj povas esti adaptitaj kaj per la fonetika elparolo kaj per la ortografia formo de la radikoj en la origina lingvo. Krome, rimarkeblas, ke longaj vokaloj estis adaptitaj, plej ofte, kiel simplaj vokaloj; kaj ke kelkaj vortoj havas du sinkronajn variantojn en la lingvo.

Markos KRAMER: Kiel krei fidindan Esperanto-vortaron?

Multaj el la lingve plej spertaj esperantistoj opinias, ke nek PIV, nek ReVo estas tute fidinda, kaj ke progresantoj devas uzi tiajn vortarojn singarde, kiam ili perfektigas sian Esperanton. Samtempe progresantoj nun ofte serĉas konsilon en interretaj forumoj kiel *Lingva Konsultejo* sur Fejsbuko aŭ la dulingva (angla/Esperanta) forumo *Esperanto Language StackExchange*. Tie lingve spertaj esperantistoj donas rekomendojn pri la lingvouzo, kiuj ofte estas pli utilaj ol la informoj troveblaj en niaj ĉefaj vortaroj. Ĉi-artikole mi proponas *Forumo-Vortaron*, interretan platformon kiu celas plievoluigi la enhavon de PIV kaj/aŭ ReVo per vikiieca sistemo, kiu inkluzivus forumon por pridiskuti specifajn lingvajn demandojn, kaj kiu sisteme donus pli da pezo al opinioj kaj redaktopropoj venintaj de lingve spertaj kontribuintoj kompare al tiuj de lingve malpli spertaj kontribuintoj.

Bengt Olof ÅRADSSON: Komparo de paroloj el retorika vidpunkto

La formala studo de parolo, la retoriko, havas longan tradicion en la okcidentaj landoj. Ekde antikvaj tempoj kaj dum la sekvaj jarcentoj, ĝi estis instruata en universitatoj kaj lernejoj, kaj havis fortan influon en la socio. En Ĉinio kaj Japanio la tradicioj estas aliaj. Pluraj esploristoj atestas la observeblajn diferencojn, kiel studentoj de diversaj kulturoj skribas tekstojn. La hejma kulturo de la skribantoj aŭ parolantoj influas ilian tekstojn kaj parolojn. Tiu ĉi studo provas esplori, ĉu estas diferencoj en la paroloj de esperanto-parolantoj kun variaj kulturaj tradicioj. Por la celo de la studo estis elektitaj el la prelegoj de la 3-a *Nitobe-simpozio* organizita en la kadro de la *Universala Esperanto-Kongreso* en 2004, en Pekino. Tamen la studo ne povis konfirmi la konstatojn faritajn de pluraj esploristoj. Malgraŭ la nesukceso prui la tezon, la aŭtoro estas konvinkita ke pli konvena metodo kaj pli granda nombro da samplaj povas montri kiel la hejmaj kulturoj influas esperantistojn en siaj paroladoj.

Wojciech USAKIEWICZ: Ĉu esperantigante Hamleton Zamenhof uzis polajn tradukojn?

En 1894 Ludoviko Zamenhof tradukis *Hamleton* en Esperanton. Kvardek jarojn pli poste en *Literatura Mondo* komenciĝis diskuto pri la bazo de la Zamenhofa traduko. Laŭ la hipotezo de G. Waringhien Zamenhof esperantigis *Hamleton* uzante du diverslingvajn tradukojn, el kiuj unu estis slava.

Utiligante komparon de la angla kaj esperanta tekstoj de *Hamleto*, kiun prilaboris D. B. Gregor, la aŭtoro esploras 82 elektitajn lokojn en ses polaj deknaŭjarcentaj tradukoj de ĉi tiu dramo (J. Komierowski, J. Paszkowski, K. Ostrowski, J. Kasprowicz, W. Matlakowski, L. Ulrich) por kontroli, kiomgrade ili ripetas la esperantajn diverĝojn indikitajn de Gregor. Kvanta analizo de la materialo ŝajnas malsugesti, ke Zamenhof

regule uzis polan tradukon dum la laboro. Plej multajn diverĝojn disde la angla teksto analogajn al la esperanta versio enhavas la traduko de Kasproicz (11 el 82, 13,4%). La aŭtoro atentigas tamen pri malgrandeco de la esplor-specimeno kaj pri klasifikaj malfacilaĵoj, tial li esprimas opinion, ke dum la analizado necesus konsideri ankaŭ enscenigajn rimarkojn (kiujn Gregor entute preterlasis) kaj problemojn ligitajn kun la listo da rolantoj. Tio kreskigus la fideindecon de la rezultoj.

LINGVISTIKAJ METODOJ EN LITERATURO

Dorotya MÓZES: **Rasa identeco, nigraj kaj blankaj prezentmanieroj en *Malhonoro (Disgrace)* de J. M. Coetzee**

Per kvalita analizo – surbaze de teoria kadro kaj metodologio de la tria ondo de socilingvistoj – tiu ĉi artikolo rigardas kiel identeco, stilo kaj prezentado estas konstruitaj en selektitaj dialogoj kaj deklaroj en la verko *Malhonoro* de J. M. Coetzee. La eseo esploras lingvan dominadon kaj kontraŭstaron kun speciala atento al la konstruado de identeco, al stiluzado, al nigraj kaj blankaj prezentadmanieroj konsistigantaj politikajn agadojn. Aplikante la koncepton de Pierre Bourdieu pri lingva konduto, demonstratas kiel la (kulturaj) prezentadmanieroj supernorme altaj de blankaj karakteroj konservas la rasajn hierarkiojn kaj reaktivigas la rasan socio-semantikan varianton de la kolonia diskurso. Unuflanke, nigraj karakteroj utiligas socilingvistikajn fontojn de prezentado, stiluzon kaj imitadon por kontraŭi (lingvan) dominadon kaj rasan diskurson. Aliflanke, blankaj karakteroj uzas kontraŭrasan lingvaĵon por kritiki rasismon kaj montri sian solidarecon kun la surmarĝenigitaj grupoj. Tiel, la artikolo montras kiel la prezentadmaniero estas enkorpigita kaj enkadrigita, kompleksa kaj ordinara, supera kaj ĉiutaga, spektakla kaj netravigebla praktiko kun profundaj rasaj, politikaj kaj etikaj implikoj.

András HLAVACSKA – Fruzsina KRIZSAI: **Funkcioj de la taglibro en *Dracula* de Bram Stoker**

La plej multaj studoj analizantaj la verkon *Drakula (Dracula)* de Bram Stoker koncentriĝas sur la gotikan tradicion en kiun ĝi estas enkadrigita, kvankam aliaj interesaj ecoj de la romano estas, ke ĝi inkludas taglibrajn fragmentojn, notojn, leterojn kaj alitipajn tekstojn. Fokusiĝante al la komplekseco de la romana ĝenro, ni uzas interbranĉan metodologion bazitan sur la teoria laboro de Bakhtin kaj sur principoj de funkcia pragmatiko por elstarigi la gravecon de tiuj ĉi tekstotipoj, speciale tiujn de taglibro kaj provas kapti kelkajn specifajn trajtojn de la ĝenro. Taglibroj estas ne nur tekstoj produktitaj enkadre de naracio, sed ili funkcias ankaŭ kiel mensa protektilo, morala devigo kaj armilo. Ni analizos la metapragmatikajn pripensojn kiel signojn

de metapragmatika konscio apartenanta al la lingva agado de verkado aŭ legado de taglibro. Fine, ni substrekas la dinamikan rilaton de la ĝenro kiel abstrakta kategorio kaj kiel ĝia konkreta apero en la teksto.

Manuela BURGHELEA: Ne perdiĝante en tradukado: kreemaj strategioj por aliri multkulturecon en Esperanto

Ĉi tiu artikolo esploras praktikojn pri tradukado en esperanton, lingvo konstruita antaŭ 130 jaroj por servi neŭtralan internacian komunikadon. Unu el la praktikaj uzoj de esperanto estas ebligi al tutmonda komunumo de parolantoj aliron al verkoj el diversaj lokoj kaj epokoj. Ni analizas la rolon de la tradukado en la disvolvado de esperanto kaj en la kreado de la esperanta komunumo. Ni argumentas ke tradukado en esperanton posedas kernan socian funkcion kaj transdonas valorojn kiuj transpasas simplan semantikan transigon. Tiucele, ni alprenas plurfakan perspektivon kaj apogas nin sur aliroj al tradukoscienco, literaturo, lingvistiko, antropologio kaj interkultura komunikado. Dialogigi tiujn alirojn utilas al pli profunda kompreno pri la diversaj strategioj uzataj de la esperante parolantaj tradukistoj por alkonformiĝi al la ekzistanta esperanta kultura horizonto aŭ male fasoni ĝin.

DIVERSAĴOJ

Ágnes DOMONKOSI: La rolo de socia sekso en la uzo de hungaraj alparolformoj

Alparolformoj direkte rilatas al la naturo de la socia rilato. La socia sekso de la diskursaj partneroj, sendepende ĉu ili estas el la samaj aŭ malsamaj seksoj, havas influon al la uzo de alparolformoj. Tiu ĉi artikolo celas prilumi la ĉefajn seksorilatajn karakterizilojn de la hungaraj alparolpraktikoj per raporto pri ampleksa socilingvistika studo bazita sur enketiloj kaj intervjuoj. Samtempe kun la perspektivo de socia konstruismo, la seksorilataj uzŝablonoj de alparoloj interpreteblas ankaŭ kiel aktivaj konstruantoj de specialaj rilatoj kaj seksaj roloj kaj ne nur ilia reflektiĝo. Do, la esplorrezultoj sugestas ke ripetigantaj modeloj en la uzo de pli konfidencaj/afekciaj formoj kun virinoj kontribuas al la konservo de virinaj soci-seksaj roloj.

Probal DASGUPTA: La Plen-Vorta Morfologio kun novaj agordoj: pledo por semi-otika redezajno

GP-PVM estas esplorprogramo uzanta PVM (la Plen-Vortan Morfologion) en la morfologio, GP (la Generan Fonotaktikon) en la fonologio kaj terendividon, kiu atri-

buas al la fonologia konsistero nur aŭtomatajn procezojn. En ĉi tiu referaĵo ni pledas por semiotiko-bazitaj mekanismoj, kiuj reagordas la aplikadon de vortfaraj strategioj en PVM. Ni proponas pakaĵojn de LSSG (Lingvo-Specifaj Semiotikaj Gvidlinioj) kaj komparas nian propran proponon, la pure semiotiko-stiratan Dezajnon laŭ Brigada Kohero por la funkciado de tia pakaĵo, kun krokize prezentata rivalo, Dezajno laŭ Diglosiaj Ekvacioj.